

汉语世界语大词典

GRANDA VORTARO ĈINA-ESPERANTA

王崇芳 编

Kompilita de Wang Chongfang

中国世界语出版社

ĈINA ESPERANTA ELDONEJO

汉语世界语大词典

GRANDA VORTARO ĈINA-ESPERANTA

王崇芳编

kompilita de Wang Chongfang

谨以本词典

献给世界语进入中国百年

OMAĜE AL LA CENTJARA JUBILEO

DE ENĈINUJĜO DE ESPERANTO

中国世界语出版社

ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO

2007 中国

2007 ĈINIO

所有权利保留。

未经许可,不得以任何方式使用。

《汉语世界语大词典》

GRANDA VORTARO ĈINA-ESPERANTA

编者 王崇芳
出版 中国世界语出版社
发行 广东省世界语协会
印刷 广东世汇商业印刷有限公司
书号 ISBN 978 - 988 - 97558 - 1 - 2
版次 2007 年 12 月第 1 版
开本 787 × 1092 1/16
印张 79.25
定价 198 元(精装) 148 元(平装)

编写 王崇芳
输入电脑 王崇芳
排版 王崇芳

前 言

这部《汉语世界语大词典》历经十四个寒暑,终于编成和读者见面了。

本词典是一部中型偏大的汉语世界语双语词典,共收主词条 71,800 余(其中单字条目约 5,600 余),附属词条 27,400 余,总共将近 100,000 词条,总字数约 4,989,800(电脑统计)。本词典的主要对象是学习或从事于用世界语写作或翻译的中国世界语者,其次是普通的世界语学习者,也兼顾想借助世界语来学习汉语的外国世界语者。

长期以来,中国相当多的世界语者学习世界语在很大程度上依赖于他们有限的英语(或其他外语)基础。这就产生了一个问题:这一部分人以这个"基础"学习世界语,往往会自觉不自觉地用英语(或其他外语)来类推世界语的说法,常常仿造出一些累赘、笨拙甚至意义不准确的语句来。用这种方式学习世界语是低效率的。实际上,只有母语才是绝大多数人真正掌握的唯一语言,对于中国人来说,通过和母语即汉语的对比来学习世界语才是最科学、最理想的方法。用这种方法学习首先必须有适用的教材和工具书。如果中国世界语者手边能有一部像汉英或汉法词典那样较完备的汉世词典,中国世界语者就可以摆脱对英语或其他外语的依赖直接通过母语来学习世界语,我们的世界语的教学和应用就会处于与其他外语相当的水平上,中国的世界语者中将有众多的人从此告别永远初学者(eterna komencanto)的状态,世界语在中国将不再是"第三语言"而成为中国人民和世界各国人民交往的真正的中介语言。

这部词典的特点可以概括为四点:收词量大,新词语多,例证丰富,释义和例句的世界语译文力求规范。

本词典的收词基本上以《现代汉语词典》为蓝本,并在此基础上遵循收词从宽的原则参照其他数种较大型的汉外词典,适当扩大了收词范围,因此除一般词语外,本词典还收有常见的文言词语、方言、成语、俗语、谚语以及社会科学和自然科学的常用词语,并尽最大可能提供确切的世界语译语。本词典的另一特点是收有大量例句。例句是词典的重要组成部分,没有例句就谈不到词典的实用性。例句可以补充词条译语的不足,进一步揭示词条的词义,揭示世界语译语的用法特点、区分译语的词义差别,也可以提供词条在不同场合和与不同词语搭配时的世界语译法。本词典的第三个特点是特别注意收进汉语中反映社会生活和科技发展的新词语,如:艾滋病,暗物质,超导,磁盘驱动器,代沟,的士,电脑,电子游戏,干细胞,计算机断层扫描(即 CT 扫描),紧俏,可视电话,录像机,迷你裙,流行音乐,牛仔裤,亲子鉴定,上网,手机,摇滚乐,影碟(即视盘),纳米,素质教育,与时俱进、智障等等,甚至还能查到"八荣八耻"的世界语表达方式和具体内容,尽量做到紧跟时代脉搏。本词典的第四个特点是力求用规范、地道的世界语来对译汉语词语,为此还特别收进柴门霍夫的用语和世界语中的惯用法。许多汉语成语在按字面翻译后,还列出与之对应或意思相近的世界语成语或惯用语(它们绝大多数出自柴门霍夫的《世界语谚语集》*Proverbaro Esperanta*)。由于本词典具有以上特点,因此无论初学者、中级水平的学习者还是从事汉世翻译的具有较高水平世界语工作者,都能从这部词典中查得各自需要的汉世对译的语言资料。这对词典使用者的学习、进修、汉世翻译和语言研究等都会有切实的帮助。

这部词典是集体知识积累的成果。在编写过程中,我参阅了数十种中外工具书,其中最主要的是商务印书馆出版的《现代汉语词典》、全世界无民族协会(SAT)出版的《世界语插图大词典》新、旧版(PIV 和 NPIV)、张闳凡先生主编的《世界语汉语词典》、中华全国世界语协会编写的《汉语世界语词典》、宫本正男先生编纂的《日

本语エスペラント辞典》、上海辞书出版社出版的《辞海》、汉语大词典出版社出版的《汉语大词典》等,并在体例、语源研究等方面利用了外语教学与研究出版社出版的《汉英词典》、商务印书馆出版的《汉法词典》、商务印书馆出版的《汉俄词典》等汉外工具书,从中汲取了大量有价值的资料。谨向所有参考书的作者和编者一并表示衷心的感谢(由于参考书众多,这里不便一一列举,本词典在附录中另列参考书目)。

这部词典也是全国新老世界语者给予我的鼓励、支持和帮助的结果。在它顺利编成之际,我特别要感谢我国已故老世界语者方善境和张闳凡两位老师。在上个世纪中国世界语运动处于沉寂的十年动乱期间,是方老通过一封封信件坚定了我对世界语的信念,使我成为一个终身的世界语者。在我世界语学习取得一些成绩时,是张老把我引上辞书编纂的道路。他不但邀我参加《世界语汉语词典》的编写和审订工作,还鼓励我编写一部收词相对全面的汉语世界语词典。我还要感谢秦凯基先生。秦先生闻知我在编写汉语世界语词典,主动把他珍藏的数本世界语工具书寄赠给我,供我参考使用。在词典编写过程中,我曾将一小部分样稿打印出来分寄给几位资深世界语者,征求意见。他们都认真审读了样稿,提出具体的指导性意见,在此我一并向他们致以衷心的感谢。在编写后期许多世界语网友在世界语论坛上表达了对词典的关注和渴望,给予我热情鼓励和支持,并为词典的出版出谋划策。我曾将部分词典稿公布在绿网的论坛上征求意见。不少网友在读了样稿后提出了改进意见,其中特别要感谢温晋根先生。温先生在百忙中审读了A到F全部样稿中的词条,并写成专文对词典稿作了中肯的评论,还对样条中的错误和不妥之处逐一提出改进意见。温先生的意见对我进一步修改词典稿具有指导作用。我的几位世界语挚友胡国柱、石成泰、张丹忱等,自始至终关注我词典编写的进展情况,经常通过电子邮件向我送来热情诚挚的鼓励和关怀。为了尽可能减少词典中错误和疏漏,在定稿前曾将词典稿分寄给数位资深世界语者审阅,然后再由编者按审阅者的意见和建议逐条修改指出的错误和疏漏。他们是周流溪先生(审阅TWXY部分),温晋根先生(审阅KLMN部分),魏以达先生(审阅ABC部分),姜祖岳先生(审阅RS部分),李威伦先生(审阅DF部分),张绍基先生(审阅Z部分),熊林平先生(审阅PQ部分),郑伯承先生(审阅J部分),赵建平先生(审阅H部分),俞荣康先生(审阅G部分),黎炜焯先生(审阅E部分)(人名以审阅量多少排列)。审阅对提高词典的质量起到了关键的作用。但由于条件所限,只一次审阅是不可能消除词典中所有的错误和疏漏的,加之又没有专业校对人员的严格把关,可以预见词典中仍有不少未发现的错误和疏漏。由于词典最后是由编者个人定稿的,因此词典中存在的错误和疏漏应由编者一人负责。

在这部词典即将出版之际,我特别要感谢林力源先生。在词典编写前期,林先生特意从广州给我送来一台电脑,并说服我学习使用电脑来编写词典。在他的鼓励和帮助下,我学会了五笔字型输入法和使用方正排版软件。用上了电脑,我的工作效率和编写速度大大提高,使编写、录入、排版、修改能一气呵成。在词典出版陷于困境的时候,林先生出于对世界语的热爱和对世界语运动的全心全意的支持,不顾各方面的困难,勇敢地承担了有关出版的全部事务和一切责任,使词典能顺利出版。

我还要感谢我的老伴儿范金花女士。她自始至终理解并全力支持我为世界语所做的一切。在词典编写过程中她不但悉心照料我的生活,使我能全身心地投入工作,而且还充当我的汉语词语的“顾问”,每当我对个别汉语词条和例句在意思上把握不准的时候,我总是和她切磋。我儿子王保志在电脑技术上给予很大的支持。从硬件维护到软件的操作使用,每次遇到障碍,总是由他来排除解决,保证了词典编写不受电脑突发事故的影响。总之,没有家人支持,这部词典是不可能顺利编成的。

词典的出版一波几折,但一直受到众多世界语者和各地世界语协会的关注和支持。一批老世界语者对词典寄托了难以忘怀的情感,特别是李森老、叶树滋老、刘铃老等年逾八旬的老前辈,他们为世界语也为这部词典的出版做了许多工作,有的甚至捐了钱还要求不公布姓名,我借此机会向他们表示衷心的感谢,也祝愿他们身体健康!我尤其要感谢广东省世界语协会和江苏省世界语协会。前者在理事长林力源教授的带领下与中国世界语出版社合作承担了词典自费出版的全部工作,后者在会长崔建华教授的带领下与广东省世界语协会一道合作承办词典的首发式和学术研讨会。可以这样说,没有这两家协会的努力,没有中国世界语出版社有效的合作,没有广大世界语朋友的支持,在市场经济的今天要出版这样一部大规模的辞书几乎是完全不可能的。

由于这部词典收词量大,其中很多词条,特别是具有浓厚的中国特有文化内涵的词语和近年来出现的社会

生活和科技方面的新词语,还是第一次进入汉世词典中,没有现成的世界语定型的译法可以借用,所以在这个意义上说,编写这部词典是一件探索性的工作,比编写一般的汉外双语词典难度更大。虽然我为编写这部词典尽了最大努力,但是我深知在我的主观努力和客观效果之间还存在不小的差距,词典中仍然存在不少没有发现的疏漏和谬误。现在我把这部词典奉献给读者,请大家在使用中不断提出批评并给予指教,以便补充它,完善它,使它更好地为世界语者大众服务。我的电子邮件地址是:zjwcfsc@163.com。

词典编者 王崇芳

二〇〇七年十二月

ANTAŬPAROLO

Mia vortaro, post dek kvar jaroj da malfacila kompilado, finfine aperas al la Esperanta publiko.

Tiu ĉi vortaro ĉina-esperanta, kiu havas pli-ol-mezgrandan amplekson, entenas pli ol 71 800 ĉefajn artikolojn (inkluzive de 5 600 artikoloj kun unuopa ideografiaĵo) kaj pli ol 27 400 subordigitajn artikolojn, t. e. , ĝi havas en si entute ĉ. 100 000 artikolojn kaj la totala nombro de la vortoj en ĝi atingas ĉ. 4 989 800 (laŭ la komputila statistiko). Ĝi servas ĉefe al ĉinaj esperantistoj, kiuj studas Esperanton aŭ uzas Esperanton en skribado aŭ tradukado, kaj ankaŭ al ordinarnaj Esperanto-lernantoj kaj eĉ al alilandaj esperantistoj, kiuj lernas la ĉinan lingvon pere de Esperanto.

De tre longa tempo ne malmultaj ĉinaj esperantistoj lernas Esperanton sin apogante sur sia limigita konado de la angla aŭ alia fremda lingvo. El tio estiĝas la jena malavantaĝo: pro tiu ĉi "konado" tiuj Esperanto-lernantoj inklinas, pli-malpli konscie, sin esprimi per frazoj aŭ esprimoj analogaj al esprimmaniero de tiu fremda lingvo, kiuj estas pezaj, malprecizaj kaj eĉ tute nelogikaj. Tiu ĉi metodo lerni Esperanton estas malbone efika. Fakte, en efektiveco, nur la gepatra lingvo estas la sola lingvo, kiun oni plej bone posedas, kaj por ni ĉinoj lerni Esperanton komparante ĝin kun nia gepatra lingvo, nome la ĉina lingvo, estas la metodo plej scienca kaj plej ideala; tiucele ni bezonas antaŭ ĉio taŭgajn lernolibrojn kaj vortarojn. Se ĉiu ĉina esperantisto posedos vortaron ĉinan-esperantan tiel same grandan, kiel vortaroj ĉinaj-anglaj aŭ ĉinaj-francaj en konsiderinda grandeco, tiam ĉinaj esperantistoj povos, sin liberigante de la sinapogo sur la angla aŭ alia fremda lingvo, lerni Esperanton komparante ĝin rekte kun sia gepatra lingvo, kaj niaj instruado kaj aplikado de Esperanto certe leviĝos al tia sama nivelo, sur kia estas la instruado kaj aplikado de fremdaj lingvoj, kaj tiam grandnombraj el la ĉinaj esperantistoj certe adiaŭos por ĉiam la staton de "eterna komencanto" kaj Esperanto, neniam plu la "tria lingvo" por ĉinaj esperantistoj, fariĝos efektiva helpa lingvo en komunikiĝado inter la ĉina kaj alilandaj popoloj.

Mia vortaro karakterizas sin per kvar trajtoj: granda amplekso, multeco de entenataj novaj vortoj kaj esprimoj, abundeco de ekzemploj, kaj kiel eble plej preciza kaj flua stilo de la Esperantaj tradukoj.

La entenado de artikoloj de mia vortaro sin bazas ĉefe sur tiu de de 《Nuntempa Ĉinlingva Vortaro》, kaj surbaze de ĝi mi plivastigas en konvena mezuro la amplekson de la entenataj artikoloj konsultante plurajn vortarojn ĉinajn-fremdlingvaj kaj sekve, krom komunuzaj vortoj kaj esprimoj, mia vortaro entenas ankaŭ vortojn kaj esprimojn en ĉina klasika skriba lingvo kaj dialektoj, kvar-silabajn idiotismojn, popolajn kutimajn dirojn, proverbojn kaj ofte uzatajn sciencajn kaj teknikajn terminojn, kiujn ĉiujn mi penas kiel eble plej precize traduki en Esperanton. La alia trajto de mia vortaro estas, ke en ĝi estas enmetitaj abundaj ekzemploj. La ekzemploj estas grava konsistiga parto de la vortaro; sen ili la vortaro perdus sian praktikecon, ĉar ili povas kompletigi nesufiĉan adekvatecon de tradukado, plilumigi la sencon de kapvortoj, montri la apartan uzadon de Esperantaj vortoj en tradukoj, diferencigi sinonimojn kaj liveri malsamajn tradukmanierojn en malsamaj kuntekstoj kaj en malsamaj kunuzadoj kun aliaj ĉinaj vortoj. La tria trajto de mia vortaro estas, ke mi donis apartan atenton al la kolektado de novaj vortoj kaj esprimoj, kiuj spegulas la nuntempan socian vivon kaj novan evoluadon de sciencoj kaj teknikoj, kiel ekzemple 艾滋病 aidoso, 暗物质 malluma materio aŭ substanco, 超导 superkondukto, 磁盘驱动器 diskodrajvo, 代沟 abismo [interspaco] inter la generacioj, 的士 tak-sio, 电脑 elektronika cerbo (populara nomo por 电子计算机), komputilo, 电子游戏 videoludo, 干细胞 trunka ĉelo, 脑细胞, 计算机断层扫描 (即 CT 扫描) komputata [komputerizita] tomografio, 紧俏 (pp varo) tre postulata, 可视电话 videofono aŭ bildotelefono, 流行音乐 popmuziko, 录像机 videoregistrato aŭ videoaparato, 迷你裙 minijupo,

纳米 nanometro, 牛仔裤 ĝinzo aŭ ĵinso, 亲子鉴定 determino de patr(in)o-ida parenceco per DNA*-testo; patr(in)eca DNA*-testo, 上网 retumi, 手机 poŝtelefono aŭ mantenebla movebla telefono, 摇滚乐 rokenrolo, 影碟 (即视盘) videodisko, 与时俱进 konstante disvolviĝi kaj antaŭeniri kun la evoluado de la epoko; (kun)progresi kun la tempo [la epoko]; sin konformigi al la tempo [la epoko], 智商 mensa handikapo aŭ intelekta malfruigo, ktp. ktp., kaj eĉ la detala enhavo de la nova esprimo 八荣八耻 “ok honoroj kaj ok hontoj” (t. e. la socialismaj konceptoj pri honoro kaj honto, kiujn ĉiu civitano de Ĉinio devas havi. — La detalojn ĉi tie mi ellasas), kaj per tio mia vortaro povas samritme kunpulsadi kun nia epoko. La kvara trajto de mia vortaro estas, ke mi penas esperantigi ĉinajn vortojn kaj esprimojn per kiel eble plej preciza kaj flua stilo, kaj tiucele mi uzas en miaj tradukoj multajn Zamenhofajn esprimojn kaj Esperantajn kutimdirojn, kiuj plejparte estas eliritaj el Zamenhofa *«Proverbaro Esperanta»*. Nun ke mia vortaro havas la suprediritajn trajtojn, ĉiu esperantisto, ĉu li estas komencanto, progresinto, aŭ ĉu li estas Esperanto-laboranto kun pli aŭ malpli alta lingva nivelo, povas ĉerpi el mia vortaro materialon de li bezonatan. Tio donos praktikan helpon al la uzantoj de la vortaro en ilia lernado aŭ plua studado de Esperanto aŭ en ilia tradukado aŭ eĉ lingvistika studado.

Tiu ĉi vortaro estas la frukto de akumuliĝo de kolektivaj scioj. Dum la kompilado mi konsultas dekojn da diversaj vortaroj kaj referencaj libroj, el kiuj la plej ĉefaj estas *«Nuntempa Ĉinlingva Vortaro»* eldonita de Komerca Eldonejo, *«Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto»* kaj *«La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto»* eldonitaj de SAT, *«Esperanto-Ĉina Vortaro»* kompilita de s-ro Honfan, *«Ĉina-Esperanta Vortaro»* kompilita de Ĉina Esperanto-Ligo, *«Vortaro Japana-Esperanta»* (dua eldono) kompilita de Miyamoto Masao, *«Cihai»* (Vorto-Mar) eldonita de Shanghai-a Vortaro-eldonejo, *«Granda Ĉinlingva Vortaro»* eldonita de Eldonejo de Granda Ĉinlingva Vortaro, ktp. kaj, koncerne la aranĝmanieron de artikoloj, etimologian esploradon ktp., profitis de *«Ĉina-Angla Vortaro»* eldonita de Eldonejo de Fremdlingva Instruado kaj Esplorado, *«Ĉina-Franca Vortaro»* eldonita de Komerca Eldonejo kaj *«Ĉina-Rusa Vortaro»* eldonita de Komerca Eldonejo kaj aliaj vortaroj ĉinaj-fremdlingvaj kaj ĉerpis multe da valora materialo el ili. Nun mi sincere esprimas mian koran dankon al la aŭtoroj kaj kompilintoj de ĉiuj konsultitaj vortaroj kaj libroj (ili estas tro multaj por esti detale cititaj).

Tiu ĉi vortaro estas ankaŭ la rezulto de mia diligenta laboro sub la kuraĝigo, subteno kaj helpo de esperantistoj junaj kaj maljunaj de Ĉinio. Ĉe la sukcesa finkompilo mi antaŭ ĉio volus danki la karmemorajn s-anojn Tikos kaj Honfan, veteranajn esperantistojn kaj miajn Esperanto-instruantojn. Dum la silentado de la Esperanta movado en Ĉinio en la tumulta jardeko (t. e. la periodo de la Kultura Revolucio 1966-1976) de la lasta jarcento, estis s-ano Tikos, kiu plifirmigis mian konvinkon pri la idealo de Esperanto per senĉesa korespondado kun mi, kaj dank' al li mi fariĝis fidela esperantisto dumviva. Kiam mi akiris sukcesojn en mia lernado de Esperanto, estis s-ano Honfan, kiu kondukis min sur la vojon de vortaro-kompilado. Li ne nur invitis min partopreni en la kompilado de la fama *«Esperanto-Ĉina Vortaro»*, sed ankaŭ instigis min kompili alian vortaron, nome vortaron ĉinan-Esperantan kun sufiĉe granda amplekso. Mi devas danki ankaŭ al s-ro Qin Kaiji, kiu, aŭdinte ke mi kompilas ĉinan-Esperantan vortaron, bonvole donacis al mi kelkajn rarajn Esperantajn librojn por mia konsultado. En la procezo de la kompilado mi kopiis per komputila presilo parton de mia kompilita vortaro kiel specimenan manuskripton kaj sendis ĝin al kelkaj kompetentaj esperantistoj por peti iliajn opiniojn. Ili ĉiuj zorge kontrolis la specimenon kaj donis siajn opiniojn, kiuj helpis min en plibonigo de la kompilado. Al ili ĉiuj mi ŝuldas plej korajn dankojn. En la lasta stadio de la kompilado multaj esperantistoj-retamikoj esprimis en interretaj Esperantaj forumoj siajn zorgan priatenton kaj ardan deziron pri pli frua finkompilo de la vortaro kaj prezentis proponojn por solvi la problemon de la eldonado. Mi ankaŭ publikigis parton de la manuskripto en Ĉina Esperanta Forumo por peti opiniojn de esperantistoj-retamikoj. Multaj el ili legis kaj donis siajn opiniojn por plibonigi la kompiladon, kaj pro tio mi volas danki inter aliaj s-ron Wen Jingen, kiu, malgraŭ sia multokupiteco, atente legis la tutan specimenan manuskripton de A ĝis F kaj skribis artikolon, en kiu li faris trafe altan taksadon pri la manuskripto kaj ankaŭ montris korektendaĵojn kaj plibonigendaĵojn en la specimeno. Liaj opinioj kaj proponoj ludis gvidan rolon en mia plua reviziado de la malneto de la vortaro. Miaj intimaj Esperanto-amikoj Hu

Guozhu, Shi Chengtai, Zhang Danchen kaj aliaj ĉiam sekvis kun intereso la kompiladon de la vortaro de la komenco ĝis la fino kaj ofte sendis al mi varmajn retmesaĝojn, kiuj alportis al mi iliajn sincerajn kuraĝigojn kaj zorgemon. Por kiom eble malmultigi erarojn kaj senatentajn preterlasojn, antaŭ ol definitivigi la manuskripton, mi sendis por kontrolo kopiojn de la manuskripto de la vortaro al pli ol dek kompetentaj esperantistoj, kaj poste, kiam la kontrolitaĵoj estis resenditaj, mi korektis ĉiujn de ili montritajn erarojn kaj preterlasojn. La kontrolintoj estis s-ro Zhou Liuxi (kiu kontrolis la partojn de T, W, X, Y), s-ro Wen Jingen (kiu kontrolis la partojn de K, L, M, N), s-ro Wei Yida (kiu kontrolis la partojn de A, B, C), s-ro Jiang Zuyue (kiu kontrolis la partojn de R, S), s-ro Li Weilun (kiu kontrolis la partojn de D, F), s-ro Zhang Shaoji (kiu kontrolis la parton de Z), s-ro Xiong Linping (kiu kontrolis la partojn de P, Q), s-ro Zhen Bocheng (kiu kontrolis la parton de J), s-ro Zhao Jianping (kiu kontrolis la parton de H), s-ro Yu Rongkang (kiu kontrolis la parton de G), s-ro Li Weizhuo (kiu kontrolis la parton de E) (la nomoj estas aranĝitaj laŭ la kvanto de kontrolitaĵoj). Ilia kontrolado ludis decidigan rolon en la bonkvaligo de la vortaro, sed mi klare konscias, ke pro la limigitaj kondiĉoj kaj manko de trejnitaj korektistoj de presprovaĵoj, estas tute neeble nur per unufoja kontrolado forigi ĉiujn erarojn kaj preterlasojn el la vortaro, kaj estas antaŭvideble, ke en mia vortaro certe ankoraŭ kaŝiĝas ne malmultaj eraroj kaj preterlasoj. Ĉar la redakcio de la vortaro estis definitivigita de mi mem, la kompilanto, mi devas sola respondeci pri ĉiuj eventualaj eraroj kaj preterlasoj en la vortaro.

Ĉi-momente, kiam la vortaro estas tuj aperonta, mi volas esprimi mian profundan dankon precipe al s-ro Lin Liyuan. En la komenca stadio de la kompilado de la vortaro min vizitis s-ro Lin kunportante komputilon el Guangzhou. Li donacis al mi la komputilon kaj sukcese persvadis min uzi komputilon en la kompilado. Dank' al lia instigo mi ellernis tajpadon de ĉinaj ideografiaĵoj kaj la uzon de la komposta programaron "Fangzheng". La uzo de la komputilo faris mian kompiladon multe pli rapida kaj mian laboron multe pli efika, kio ebligis, ke la kompilado, la entajpado en komputilon, la kompostado kaj korektado kaj rekorektado estu plenumitaj en unu fojo. Kiam la eldonado de la vortaro estis en senelira situacio, estis s-ro Lin, kiu, el la amo al Esperanto kaj la fervoro subteni Esperantan movadon, malgraŭ ĉiaj malfaciloj, kuraĝe prenis sur sin la tutan respondecon kaj ĉiujn aferojn koncernantajn la eldonadon de la vortaro kaj ĉiel klopodadis, por ke la vortaro povu sukcese eldoniĝi.

Mi ankaŭ ŝuldas dankon al mia kara edzino. Ŝi ĉiam montris komprenemon al ĉio, kion mi faras por Esperanto. Dum la longa kompilado de la vortaro ŝi ne nur faris grandan prizorgon al mia vivo, por ke mi povu koncentri min sur mian laboron, sed ankaŭ servis kiel mia "konsilisto" pri iuj ĉinlingvaj vortoj kaj esprimoj. Kiam ajn mi ne estas tute certa pri la preciza senco de iu ĉina vorto aŭ esprimo esperantigota, mi diskutis kun ŝi pri ĝi. Mia filo liveris al mi multan helpon koncerne komputilan teknikon. Kiam ajn mi havis ĝenaĵon en la uzo de programaro aŭ ĉe misfunkcio de aparataro, li ĉiel penis por mi forigi la ĝenaĵon kaj riparis paneon, tiel ke mia kompilado neniam estis damaĝita de komputila akcidento. Unuvorte, sen la subteno de miaj familianoj mia vortaro neniel povus finkompiliĝi.

La eldonado de mia vortaro trairis tre zigzagan vojon, tamen ĉiam estis priatentata kaj subtenata de grandnombraj esperantistoj kaj Esperantaj asocioj en diversaj lokoj de Ĉinio. Pluraj veteranaj esperantistoj esprimis siajn sentojn por mi neforgeseblajn, el kiuj mi volas aparte mencii la nomojn de tri maljunaj samideanoj, nome la pli-ol-okdekjaraj s-ro Li Sen, s-ro Ye Shuzi, s-ro Liu Ling. Ili ĉiuj faris kaj faras multon por Esperanto kaj ankaŭ por la eldonado de mia vortaro. Iuj el ili eĉ faris mondonacon postulante, ke oni ne publikigu iliajn nomojn. Mi do profitu de tiu ĉi okazo por esprimi al ili mian koran dankon kaj sinceran deziron, ke ili ĝuu bonan sanon. Mi ŝuldas apartan dankon ankaŭ al Esperanta Asocio de Guangdong-provinco kaj Esperanta Asocio de Jiangsu-provinco. La unua, sub la gvido de sia prezidanto prof. Lin Liyuan, kunlaborante kun la Ĉina Esperanto-Eldonejo, prenis sur sin la taskon eldoni mian vortaron je sia propra kalkulo; la dua, sub la gvido de sia prezidanto profesorino Cui Jianhua, kune kun la unua, sin ŝarĝas per la arango de ceremonio solenanta la unuan publikigon de mia vortaro. Tute sentroige oni ja povas diri, ke sen la penado de la du asocioj, sen la efika kunlaboro de la Ĉina Esperanto-Eldonejo kaj sen la subteno de la vasta esperantaro estus preskaŭ tute neeble eldoni vortaron tiel grandan kiel la mia en la nuntempo, en kiu regas merkatekonomio.

Ĉar mia vortaro estas grandampleksa, en kiu multaj artikoloj, precipe la vortoj kaj esprimoj, kiuj havas profundan signifon propran al la ĉina kulturo, kaj la novaj vortoj spegulantaj la socian vivon kaj la terminoj sciencaj kaj teknikaj, kiuj estas unuafoje enmetitaj en Esperantan vortaron kaj tradukitaj de mi sen pretaj Esperantaj tradukmanieroj por pruntepreno, tial en tiu ĉi senco la kompilado de mia vortaro estas laboro exploreca kaj sekve pli malfacila ol tiu de ordinara vortaro ĉinaj-fremdlingvaj. Kvankam mi faris mian plejebelon por la kompilado, tamen mi bone konscias, ke inter mia persona penado kaj la efektiva efiko estas ne malgranda distanco, kaj ke en mia vortaro certe ankoraŭ troviĝas ne malmultaj eraroj kaj senatentaj preterlasoj ne malkaŝitaj. Nun, malgraŭ tio, mi humile prezentas tiun ĉi vortaron al la esperantista publiko kun la sincera espero, ke oni senĉese faros kritikojn kontraŭ ĝi kaj ne ŝparos siajn konsilojn kaj komentojn kun la celo ĝin kompletigi kaj plibonigi, por ke ĝi povu pli bone servi la vastan esperantistaron. Mia retpoŝta adreso estas: zjwcfsc@163.com

Wang Chongfang, la kompilinto de la vortaro

Decembre 2007

凡 例

一. 条目安排

1. 本词典所收条目分单字条目和多字条目。
2. 不能成词、又不能引出多字条目的单字，不立条。如：“蚯蚓”的“蚓”，“邂逅”的“逅”。只作姓氏用的字，也不立条；单字条目中也不收姓氏义项。
3. 单字条目按汉语拼音字母顺序排列。同音同调的汉字按笔划多少排列。
4. 多字条目按第一个字分列于该单字条目之下。同一单字条目下的多字条目不止一条时，按第二个字的汉语拼音字母顺序和笔划多少排列。第二个字相同时，按第三个字排列，依此类推。儿化词注音中的 *r* 不计入顺序字母。例：【肉皮儿】[ròupír] 排在【肉皮】[ròupí] 之后，【肉片】[ròupiàn] 之前；【人缘儿】[rényuánr] 排在【人员】[rényuán] 之后，【人猿】[rényuán] 之前。
5. 单字或多字条目形同而音、义不同的，分列条目。如：“好”[hǎo] 和“好”[hào]，“长”[cháng] 和“长”[zhǎng]；“温和”[wēnhé] 和“温和”[wēnhuò]；“播种”[bōzhǒng] 和“播种”[bōzhòng]。分列的条目加注“另见……”字样。例：在“好”[hǎo] 之后加注“另见[hào]”；在“温和”[wēnhé] 之后加注“另见[wēnhuò]”。
6. 汉字字形及字音相同而意义不同者，不考虑其词源，均作同一条目的不同义项处理，用①、②、③……分开。
7. 轻声单字条目，一般紧接在非轻声单字条目之后；带轻声字的多字条目紧接在同形的无轻声字的多字条目之后。如：“家”[jiā] 排在“家”[jiǎ] 之后；“大方”[dàfāng] 排在“大方”[dàfāng] 之后。但“把”[ba]、“了”[le]、“着”[zhe] 等轻声单字条目排在该字所属的音节最后，即去声之后。
8. 在同一单字条目下，多字条目意义相同、用字略有差异者，一般只收常用形式，而在条目注音后加“也作……”、“也说……”等字样。如：【百折不挠】[bǎi zhé bù náo]（也说“百折不回”[bǎi zhé bù huí]）。
9. 以多字条目领头的合成词，如无例证，不单独立条。它们按汉语拼音字母顺序集中排列在条目的对译或例证之后，前面加一菱形“◇”。

如：

【玻璃】…… ◇ ~ 板 vitropolit; domvitro / ~ 版 kolotipo* / ~ 杯 glaso / ~ 布 vitra tolo / ~ 橱窗 elmontra vitro\$ranko; vitrino / ~ 刀 vitrotranĉilo / ……

二. 注音

1. 条目用汉语拼音字母注音。汉语拼音字母一律置于方括号中，以示区别。
2. 声调一般只注原调，不注变调。
3. 轻声不标调号。如：【葡萄】[pútáo]，【什么的】[shénmede]。
4. 儿化音只在基本形式后面加 *r*，不标语音的实际变化。如【冰棍儿】[bīnggùnr]，【相片儿】[xiàngpiānr]。
5. 多字条目的注音中音节界限有可能混淆时，加隔音号“'”。如：【答案】[dá' àn]，【木偶】[mù' ǒu]。
6. 专名的注音，第一个字母用大写。如：【泰山】[Tàishān]；【三国】[Sān Guó]。

三. 释目

1. 专业条目和用语一般注明所属专业或学科名称。名称或其略语放在尖括号“〈 〉”内。参看略语表。
2. 词类的标注限于六种虚词（副词、介词、连词、叹词、象声词、助词）和量词，所用略语也放在尖括号“〈 〉”内。有些条目还附上有关风格色彩的标注。如：〈旧〉、〈口〉、〈书〉等。参看略语表。
3. 有关语法特征、使用范围等方面的简要说明放在圆括号“（ ）”内。如：
被 [bèi] …… ④〈介〉（在被动式中表示主动者）…… ⑤〈助〉（用在动词前，表示主语是被动者）……
4. 条目如系简称，一般注出全称。如：
【妇联】……〈简〉（妇女联合会）……
【人大】……〈简〉（全国人民代表大会）……
5. 单义项目一般不作汉语解释。为分辨词义和查阅方便起见，对多项条目分别作简要的汉语提示或标注有关的专业或学科略语。如：
【潮流】…… ①（水流）…… ②（趋势）……

或加学科注记,如:

【气孔】…… ①〈植〉…… ②〈动〉…… ③〈治〉…… ④〈建〉……

6. 有些单义条项目在不同场合有不同对译词语,则酌情加以区分,如:

【产卵】…… (pp birdoj, insektoj ktp) demeti [ellasi] ovojn; ovumi; (pp fiŝoj, ranoj ktp) fraji

四. 对译和例证

1. 条目一般采取对译方式,即将对应的世界语词语列出。如果没有适当对应的世界语词语,则音译加简单注释,如:

炕 [kǎng] *kang* -o, granda lito uzata en la norda parto de Ĉinio, masonita el brikoj aŭ adoboj, en kiun oni enkondukas varmon el forno por ĝin hejti vintre; hejtebla briklito; terlito

或用世界语释义,如:

【气臌】…… 〈中医〉 streĉigo de abdomeno kaŭzita de akumuligo de gaso pro misfunkcio de lieno aŭ pro emociaj faktoroj

2. 有些条目先用世界语作字面解释,然后释义,二者之间加破折号。如:

【八仙桌】…… tablo de Ok Senmortemuloj — ĉinstila kvadrata tablo por ok personoj

【门可罗雀】…… oni povas kapti paserojn antaŭ la pordo — vizitantoj estas tre maloftaj; preskaŭ neniu vizitas la domon

3. 有些条目在释义后还就有关背景、典故等加以补充说明,说明部分放在圆括号内。如:

【五四运动】…… la Movado de la 4-a de Majo de 1919 (politika kaj kultura movado kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo); Kvara-Maja Movado

【南柯一梦】…… Nanke-songo (el la antikva rakonto pri juna klerulo, kiu sonĝis, ke li fariĝas prefekto de Nanke en la Formika Reĝlando kaj atingas grandan famon kaj sukceson) — bela (fantazia) sonĝo; iluzia ĝojo

4. 某些专业条目在用世界语对译后加拉丁语学名(斜体)或其他符号(有时附简略说明),某些条目在对译后附世界语略语。它们均放在圆括号内。如:

【当归】…… ĉina angelio (*Angelica sinensis*)

【瓦时】…… 〈电〉 vathoro (Wh)

铬 [gè] 〈化〉 kromo (24 号元素,符号 Cr)

5. 本身无意义,只用作构词成分的单字条目,一般不作对译。如:

蝴蝶 [hú]

【蝴蝶】…… papilio

6. 词条在给出对译词语后,根据需要可收入词、词组或句子作为例证。例证前加冒号“:”。例证中与本条目相同的词语用代字号“~”表示。词条对译及例证中的对译词或词组不止一个时用分号“;”隔开;例证的对译如果是两个不同的句子,用“或”连接。例证与例证之间用单斜线“/”隔开。如:

酒 [jiǔ] alkohola trinkaĵo; alkoholaĵo; drinkaĵo; vino; brando: 借~浇愁 dispeli sian ĉagrenon per vino; fordrinki sian ĉagrenon

【眉头】…… brovoj; 皱~ kuntiri [kunŝovi, sulkigi] la brovojn / ~一皱,计上心来。Ĉe ekkuntiro de la brovoj venas al la kapo bona ideo.

或 Ekkunŝoviĝas la brovoj, kaj plano [ruzo] venas al la kapo. 或 Je brovkuntiro ekestas ruz-akiro.

例证中的本条目如果中间插入了别的字,就不用“~”代替。如:

【说话】…… ①(讲话) paroli; diri; sin esprimi; …… / 感动得说不出话来 esti tro emociita por diri ion; ne povi eldiri eĉ unu vorton pro emocio / ……

7. 词条对译及例证中可替换的词语,放在方括号“[]”内。如:

【法器】…… muzikaj instrumentoj uzataj en budhismaj [taŭlismaj] ceremonioj

食 [shí] …… ⑤〈天〉 eklipso: 日[月]~ eklipso de suno [de luno]

8. 词条对译中可省略的词语,放在圆括号“()”内。如:

【牛奶】…… (bovina) lakto

【留任】…… resti sur la (sama) posteno; daŭrigi teni sian oficon

9. 词条对译或例证中如果有柴门霍夫用语,一般在其末尾加注“(z)”。如:

人 [rén] ①(人类;个人) homo; persono; individuo; homoj; homaro; iu; oni; …… 谋事在人,成事在天。Homo proponas, Dio disponas. (z) 或 Homo pafas, Dio trafas. (z) / ……

【如坐针毡】…… sidi (kiel) sur pingloj (z); sidi kvazaŭ sur flamantaj karboj; esti en senpacienca streĉiteco

10. 词条对译及例证中如果出现《世界语插图大词典》(*Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*) 未收的新词,一律用星号“*”标出。旧词增加新义,也用星号标出。如:

【口音】…… ②(方音) akĉento*: 说话带广东~ paroli kun Guangdong-a akĉento* / 有南方~ havi sudan akĉenton*

【项目】…… disciplino*: …… 田径~ atletikaj sportspecoj [disciplinoj*]

GVIDILO AL LA UZO DE LA VORTARO

I. Arango de Artikoloj

1. La vortaro entenas artikolojn konsistantajn el unuopa ideografio kaj artikolojn el pluraj ideografioj.
2. La ideografio, kiu ne povas funkcii memstare kiel vorto, nek servi kiel kapo de plurideografiaj artikoloj, ne estas entenata kiel artikolo, kiel ekz. “蚓” en “蚯蚓”, “逅” en “邂逅”. Ankaŭ la ideografio, kiu estas uzata nur kiel familia nomo, ne estas entenata kiel artikolo; nek la familinoma senco en la unuideografia artikolo estas entenata.
3. La unuideografiaj artikoloj estas aranĝitaj laŭ la ordo de la ĉinlingva fonetika alfabeto. La ideografioj samsonaj kaj samtonaj estas aranĝitaj laŭ la nombro de strekoj.
4. La plurideografiaj artikoloj estas aranĝitaj laŭ la unua ideografio sub la sama unuideografia kapartikolo. Se la plurideografiaj artikoloj sub la sama unuideografia kapartikolo estas pli ol unu, ili estas aranĝitaj laŭ la ordo de la ĉinlingva fonetika alfabeto kaj laŭ la nombro de strekoj de la dua ideografio. Se ilia dua ideografio estas sama, ili estas aranĝitaj laŭ la tria ideografio, kaj tiel plu kaj simile. La sono “r” en vorto kun sufikso de nesilaba “r” estas neglektata en laŭorda arango, kiel ekz. [肉皮儿] [ròupír] estas metita post [肉皮] [ròupí] kaj antaŭ [肉片] [ròupiàn]; [人缘儿] [rényuánr] estas metita post [人员] [rényuán] kaj antaŭ [人猿] [rényuán].
5. La unuideografiaj aŭ plurideografiaj vortoj, kiuj havas saman formon sed malsamajn sonon kaj signifon, estas aranĝitaj kiel apartaj artikoloj, kiel ekz. “好” [hǎo] kaj “好” [hào]; “长” [cháng] kaj “长” [zhǎng]; “温和” [wēnhé] kaj “温和” [wēnhuo]; “播种” [bōzhǒng] kaj “播种” [bōzhòng].
6. La vortoj kun tia(j) ideografio(j), kiu(j) havas samajn formon kaj sonon sed malsaman signifon, estas traktataj kiel malsamaj sencoj de la sama artikolo senkonsidere pri iliaj etimoj, kaj la malsamaj sencoj estas apartigitaj inter si per numeroj ①, ②, ③ ...
7. La artikolo el unuopa ideografio de senakcenta silabo estas ordinare metita tuj post la artikolo kun akcenta silabo, kaj la plurideografia artikolo kun senakcenta silabo estas metita tuj post la samforma plurideografia artikolo sen senakcenta silabo, ekz. “家” [jiā] estas post “家” [jià]; “大方” [dàfāng] post “大方” [dǎfāng]. Sed tiaj artikoloj el unuopa ideografio de senakcenta silabo kiel “把” [bǎ], “了” [le], “着” [zhe] estas metitaj ĉe la fino de la artikoloj kun la sama silabo, t. e. post la malsuprena tono de la silabo.
8. Sub sama unuideografia kapartikolo, ordinare nur la ofte uzata el plurideografiaj vortoj, kiuj havas saman signifon sed iom diferencon formon, estas traktata kiel artikolo, kaj post ĝia fonetika indiko estas aldonita “也作……” (ankaŭ en formo de...) aŭ “也说……” (ankaŭ dirita kiel...), kiel ekz. [百折不挠] [bǎi zhé bù náo] (也说“百折不回” [bǎi zhé bù huí]).
9. La kunmetitaj vortoj, kiuj komenciĝas per plurideografia artikolo, se ili ne havas ekzemplojn, ne estas traktataj kiel memstaraj artikoloj. Ili estas metitaj post la traduko(j) kaj ekzemplo(j) de la plurideografia artikolo laŭ la ordo de la ĉinlingva fonetika alfabeto, kun antaŭmetita signo ◇. Ekz.: [玻璃]…… ◇ ~ 板 vitroplato; domvitro / ~ 版 kolotipo * / ~ 杯 glaso / ~ 布 vitra tolo / ~ 橱 elmontra vitroŝranko; vitrino / ~ 刀 vitrotranĉilo / ...

II. Fonetika Indikado

1. Ĉiu artikolo estas indikita per apudmetitaj signoj de la ĉinlingva fonetika alfabeto. La fonetikaj signoj estas metitaj inter rektaj krampoj.
2. La ideografio ordinare estas signita nur per sia origina tono, ne per sia tona modifo.
3. La ideografio de senakcenta silabo ne estas signita per tonsigno, kiel ekz. [葡萄] [pútáo], [什么的] [shénmede].
4. La vorto kun sufikso de nesilaba “r” estas signita nur per “r” sen indiko pri efektiva ŝango en prononco, kiel ekz. [冰棍儿] [bīnggùnr], [相片儿] [xiàngpiānr].
5. Kiam la limo de la du silaboj en plurideografia artikolo estas konfuza en fonetika indiko, la silabodivida signo (’) estas uzata por ilin disigi, ekz. [答案] [dá’àn], [木偶] [mù’ǒu].
6. La komenca litero de fonetika indiko de propra nomo estas majuskle presita.

III. Klarigado de Artikoloj

1. La faka artikolo ordinare estas signita per la nomo aŭ mallongigo de la fako aŭ sciencobranĉo, al kiu ĝi apartenas. La nomo aŭ mallongigo estas metita inter angulaj krampoj. Bonvole vidu la liston “Mallongigoj Uzataj en la Vortaro”.

2. Nur la ses specoj de funkciaj vortoj (adverbo, prepozicio, konjunkcio, interjekcio, onomatopeo kaj helpa vorto) kaj mezurvorto estas indikitaj pri gramatika kategorio, kaj la uzata mallongigo estas metita ankaŭ inter angulaj krampoj. Iuj artikoloj estas signifitaj ankaŭ per mallongigo pri stila koloro, kiel ekz. 〈旧〉, 〈口〉, 〈书〉 ktp. Bonvole vidu la liston "Mallongigoj Uzataj en la Vortaro".

3. La klarigo pri gramatika karakterizaĵo aŭ uzado estas metita inter rondaj krampoj, ekz. :

被 [bèi] ④〈介〉(在被动式中表示主动者) ⑤〈助〉(用在动词前,表示主语是被动者)

4. Se la artikolo propre estas mallongigita formo de nomo aŭ esprimo, ĝi estas signita per 〈简〉 (mallongigo) kun aldono de la plena nomo aŭ esprimo. Ekz. :

【妇联】.....〈简〉(妇女联合会)

【人大】.....〈简〉(全国人民代表大会)

5. La artikolo de unuopa senco ordinare ne estas ĉinlingve klarigita, sed, por sencodiferencigo kaj por faciligo de konsultado, ĉiu el la sencoj de la plursenca artikolo estas indikita en konciza ĉina lingvo aŭ signita per mallongigo de fako aŭ sciencobranĉo, .. Ekz. :

【潮流】..... ①(水流) ②(趋势)

【气孔】..... ①(植) ②(动) ③(冶) ④(建)

6. Se iuj unusencaj artikoloj havas malsamajn tradukojn en malsamaj okazoj, la tradukoj estas iel diferencigitaj inter si laŭ la cirkonstancoj. Ekz. :

【产卵】..... (pp birdoj, insektoj ktp) demeti [ellasi] ovoj; ovumi; (pp fiŝoj, ranoj ktp) fraji

IV. Tradukoj kaj Ekzemploj

1. La artikoloj ordinare estas tradukitaj per Esperantaj ekvivalentoj aŭ per kiel eble plej egalsencaj vortoj aŭ esprimoj. Se mankas tiaj tradukvortoj, ili estas fonetike transskribitaj en Esperanton kun aldono de konciza klarigo. Ekz. :

炕 [kàng] *kang* -o, granda lito uzata en la norda parto de Ĉinio, masonita el brikoj aŭ adoboj, en kiun oni enkondukas varmon el forno por ĝin hejti vintre; hejtebla briklito; terlito

aŭ tute klarigitaj per Esperanta difino, ekz. :

【气臆】..... 〈中医〉 streĉigo de abdomeno kaŭzita de akumuliĝo de gaso pro misfunkcio de lieno aŭ pro emociaj faktoroj

2. Iuj artikoloj estas unue laŭvorte tradukitaj en Esperanton kaj poste estas Esperante klarigitaj, kaj inter la laŭvorta traduko kaj la klarigo estas metita haltostreko. Ekz. :

【八仙桌】..... tablo de Ok Senmortemuloj — ĉinstila kvadrata tablo por ok personoj

【门可罗雀】..... oni povas kapti paserojn antaŭ la pordo — vizitantoj estas tre maloftaj; preskaŭ neniu vizitas la domon

3. Iuj artikoloj havas, post la traduko, ankaŭ aldonan klarigon pri historia fono, literatura aŭ historia aludo ktp, kaj la klarigo estas metita inter rondaj krampoj. Ekz. :

【五四运动】..... la Movado de la 4-a de Majo de 1919 (politika kaj kultura movado kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo); Kvara-Maja Movado

【南柯一梦】..... Nanke-songo (el la antikva rakonto pri juna klerulo, kiu sonĝis, ke li fariĝas prefekto de Nanke en la Formika Reĝlando kaj atingas grandan famon kaj sukceson) — bela (fantazia) sono; iluzia gojo

4. Al iuj fakaj artikoloj estas aldonita latina nomo (per kursivaj literoj), signo aŭ simbolo (iafoje kun konciza klarigo) aŭ Esperanta mallongigo. Ili ĉiuj estas metitaj inter rondaj krampoj. Ekz. :

【当归】..... ĉina angelio (*Angelica sinensis*)

【瓦时】..... 〈电〉 *vathoro* (Wh)

铬 [gè] 〈化〉kromo (24 号元素, 符号 Cr)

5. La artikolo el unuopa ideografiaĵo, kiu ne havas sian propran sencon sed funkcias nur kiel vortfara elemento, ordinare ne estas tradukita. Ekz. :

蠍 [há]

【蝴蝶】..... papilio

6. Post la traduko de artikolo laŭbezone povas esti citita(j) vorto(j), vortgrupo(j) aŭ frazo(j) kiel ekzemplo(j), kaj antaŭ la ekzemplo(j) estas metita dupunkto (:). Se en ekzemplo(j) troviĝas vorto(j) sama(j) kun la artikolo, tiu(j) vorto(j) estas signifitaj per tildo (~). Se la artikolo aŭ ekzemplo havas pli ol unu la tradukoj, ili estas apartigitaj unu de alia per punktokomo (;); se la tradukoj de ekzemplo estas du malsamaj frazoj, ili estas kunligitaj per 或 (aŭ). La ekzemploj estas apartigitaj unu de alia per oblikva streko (/). Ekz. :

酒 [jiǔ] alkohola trinkaĵo; alkoholaĵo; drinkaĵo; vino; brando: 借 ~ 浇愁 dispeli sian ĉagrenon per vino; fordrinki sian ĉagrenon

【眉头】..... brovoj: 皱 ~ kuntiri [kunŝovi, sulkigi] la brovojn / ~ 一皱, 计上心来。 Ĉe ekkuntiro de la brovoj venas al la kapo bona ideo. 或 Ekkunŝoviĝas la brovoj, kaj plano [ruzo] venas al la kapo. 或 Je brovkuntiro ekestas ruz-akiro.

Se en ekzemploj la artikolovortoj estas intermetitaj per alia vorto, la artikolovortoj ne estas anstataŭigitaj per ~.

【说话】..... ①(讲话) paroli; diri; sin esprimi; / 感动得说不出话来 esti tro emociita por diri ion; ne povi eldiri eĉ unu vorton pro emocio /

7. Se en la traduko(j) de artikolo aŭ en la ekzemplo(j) troviĝas vorto(j), kiu(j) estas anstataŭigebla(j) per alia(j) vorto(j), ĉi-last(a) (j) estas metita(j) inter rektaj krampoj. Ekz. :

【法器】..... muzikaj instrumentoj uzataj en budhismaj [taŭismaj] ceremonioj

食 [shí] ⑤〈天〉 eklipso: 日[月] ~ eklipso de suno [de luno]

8. Se en la traduko de artikolo troviĝas ellasebla(j) vorto(j), la ellaseblaĵo estas metita en rondaj krampoj. Ekz.:

【牛奶】…… (bovina) lakto

【留任】…… resti sur la (sama) posteno; daŭrigi teni sian oficon

9. Se en la traduko de artikolo estas citita(j) Zamenhofa(j) vortoj aŭ esprimo(j), la citaĵo(j) ordinare estas signita(j) per “(z)”. Ekz.:

人 [rén] ①(人类; 个人) homo; persono; individuo; homoj; homaro; iu; oni: …… 谋事在人, 成事在天。Homo proponas, Dio disponas.
(z) 或 Homo pafas, Dio trafas. (z) / ……

【如坐针毡】…… sidi (kiel) sur pingloj (z); sidi kvazaŭ sur flamantaj karboj; esti en senpacienca streĉiteco

10. Se en tradukoj de artikolo aŭ ekzemplo aperas neologismo, kiu ne troviĝas en *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, ĝi estas senescepte signita per steleto (*). Ankaŭ nova senco de malnova vorto estas steletita. Ekz.:

【口音】…… ②(方言) akĉento*: 说话带广东 ~ paroli kun Guangdong-a akĉento* / 有南方 ~ havi sudan akĉenton*

【项目】…… disciplino*; …… 田径 ~ atletikaj sportospecoj [disciplinoj*]

本词典使用的缩略语

Mallongigoj Uzataj en la Vortaro

汉语缩略语

(按汉语拼音字母顺序排列)

〈贬〉贬义 (en malŝata senco)	〈气〉气象学 (meteologio)
〈测〉测绘 (topografado)	〈谦〉谦辞 (humila vorto)
〈地〉地质学; 地理学 (geologio; geografio)	〈商〉商业 (komerco)
〈电〉电学; 电工 (elektroscienco; elektrotekniko)	〈摄〉摄影 (fotografio)
〈动〉动物; 动物学 (animalo; zoologio)	〈生〉生物 (biologio)
〈法〉法律 (juro)	〈生化〉生物化学 (biokemio)
〈方〉方言 (dialekto)	〈生理〉生理学; 解剖学 (fiziologio; anatomio)
〈纺〉纺织 (ŝpinado kaj teksado)	〈史〉历史 (historio)
〈讽〉讽刺语 (sarkasmo; moko)	〈书〉文言书面语 (klasika skriba lingvo)
〈副〉副词 (adverbo)	〈数〉数学 (matematiko)
〈工美〉工艺美术 (artoj kaj metioj)	〈水〉水利 (akvoutiligo)
〈古生〉古生物学 (paleontologio)	〈叹〉叹词 (interjekcio)
〈海〉海事 (maraj aferoj)	〈套〉客套语 (formulo de ĝentileco)
〈化〉化学; 化工 (kemio; kemia industrio)	〈体〉体育 (sporto)
〈化纤〉化学纤维 (kemia fibro)	〈天〉天文学 (astronomio)
〈环保〉环境保护 (media protekto)	〈统〉统计学 (statistiko)
〈机〉机械 (mekaniko)	〈外〉外交 (diplomatio)
〈计〉计算技术 (komputada tekniko)	〈婉〉婉辞 (eŭfemismo)
〈技〉技术 (tekniko)	〈微〉微生物 (mikrobiologio)
〈简〉简称 (mallongigo)	〈无〉无线电 (radiotekniko)
〈建〉建筑 (arkitekturo)	〈物〉物理学 (fiziko)
〈交〉交通 (trafiko)	〈象〉象声词 (onomatopeo)
〈教〉教育 (edukado)	〈心〉心理学 (psikologio)
〈介〉介词 (prepozicio)	〈信〉信息技术 (informotekniko)
〈经〉经济; 经济学 (ekonomio; ekonomiko)	〈讯〉电信 (telekomuniko)
〈敬〉敬辞 (ĝentila esprimo)	〈谚〉谚语 (proverbo)
〈旧〉旧时用语 (arkaikaĵo)	〈药〉药物; 药理学 (medikamento; farmakologio)
〈剧〉戏剧 (teatro)	〈冶〉冶金 (metalurgio)
〈军〉军事 (militaj aferoj)	〈医〉医学 (medicino)
〈考〉考古 (arkeologio)	〈印〉印刷 (presado; tipografio)
〈空〉航空 (aviado)	〈邮〉邮政 (poŝta servo)
〈口〉口语 (parola lingvo)	〈渔〉渔业 (fiŝado)
〈矿〉矿物; 矿业 (mineralo; mina industrio)	〈宇航〉宇宙航行 (spaconavigado)
〈连〉连词 (konjunkcio)	〈语〉语言学 (lingvistiko)
〈量〉量词 (mezurvorto)	〈喻〉比喻用法 (metafora uzado)
〈林〉林业 (forstkulturo)	〈乐〉音乐 (muziko)
〈逻〉逻辑学 (logiko)	〈哲〉哲学 (filozofio)
〈骂〉骂人话 (insulto; blasfermo)	〈植〉植物; 植物学 (vegataĵo; botaniko)
〈美〉美术 (belartoj)	〈纸〉造纸 (paperfarado)
〈牧〉畜牧业 (brutobredado)	〈助〉助词 (helpa vorto)
〈农〉农业 (agrikulturo)	〈自〉自动控制 (aŭtomata regado)